# „КОВНО-ЭСПЕРАНТО“ ★★★ „KOVNO-ESPERANTO“

**Журналъ Ковенскаго Общества Эсперантистовъ**

★★★

Подписная цѣна: за годъ—1 руб., за 6 мѣс.—60 коп. Пожизненные и дѣйств. члены К.О.Э. получаютъ въ Ковнѣ журналъ безплатно. За перес. по почтѣ особо уплач.: за годъ—60 к. и за 6 мѣс.—30 к.

**Адресъ редакціи: Ковна, Б.-Садовая, д. Рацъ**

★★★

**Цѣна отд. №—3 коп., въ пров. и съ перес. 5 к.**

★★★

Отъ 10 до 30 №№ въ годъ.



**№ 6 (20)**

1913.

*6 Апрѣля*

*19 Aprilo*

★

**Presorgano de Kovna Esperantista Societo**

★★★

Abonprezo: Jare—1 sm., duonjare—60 sd. Dumvivaj kaj efektivaj membroj de K.E.S. ricevas la jurnalon en Kovno senpage. La poŝtelspezoj —60 sd. p. jaro, 30 sd. p duonjaro.

**Adreso de Redakcio: RUSLANDO. KOVNA Esperantista Societo.**

★★★

**Unu ekz.—3 sd., en provincoj —5 sd., eksterlande—7 sd.**

★★★

Dum la jaro 10—30 numerojn.

Текущій счетъ въ Ковенск. Отдѣл. Соед. Банка (№ 916) и въ Esperantista Ĉekbanko


Правленіе проситъ лицъ, желающихъ оставаться въ составѣ Общества, возобновить членскіе взносы. Взносы принимаются въ помѣщеніи Общества (Б. Садовая, д. Рацъ) ежедневно отъ 6 до 8 веч., въ Соединенномъ Банкѣ на текущій счетъ № 916 и въ книжномъ магазинѣ Завадскаго (Рутскаго).

*Ковна 6 Апрѣля.*

Мы съ удовольствіемъ можемъ отмѣтить, что Эсперанто укрѣпляется въ оффиціальныхъ русскихъ сферахъ. По условіямъ нашей жизни, инициатива въ новомъ дѣлѣ должна исходить изъ оффиціальныхъ круговъ: когда послѣдніе сдѣлаются благосклонными къ эсперантскому движенію и выразятъ это въ активной формѣ, тогда къ намъ придутъ со своей помощью печать и общество.

Вскорѣ мы надѣемся сообщить нашимъ читателямъ по этому вопросу болѣе подробныя и важныя свѣдѣнія.

*Kovno 6/19 Aprilo.*

Ni povas kun ĝojo konstati, ke Esperanto pli kaj pli enradikiĝas en oficialaj rusaj sferoj. Laŭ kondiĉoj de rusa vivo, ne el sociaj rondoj, sed el oficialaj ni devas atendi unuajn favorajn paŝojn kaj agojn en nia afero; nur tiam rusa gazetaro kaj societo (mondo) estos ankaŭ favora al ni kaj eklaboros por la disvastigo de nia lingvo, kiam la oficialaj sferoj en Ruslando aktive esprimos sian favorecon al Esperanto.

Baldaŭ ni donos al niaj legantoj pli detalajn kaj gravajn sciigojn pri tiu ĉi demando.



# Хроника Общества

## Kroniko de Kovna Esperantista Societo (Ruslando).

— La 22-an de Marto en loka komerclernejo okazis 24-a ordinara kunsido de l'Komitato de K. E. S.

— Ĉeestis 40 membroj. En la salono, ornamita per girlandoj kaj flagoj, estis aranĝita ekspozicio de l'literaturaĵoj kaj esperantaj ĵurnaloj (pli ol 60 malsamaj).

— Honora membro A. M. Nedoŝivín faris paroladon pri sia vizito de nia Majstro—la 2-an de Marto. Post Varsovio S-ro Nedoŝivin forveturis Peterdurgon, kie estis akceptita de la Ministro de Komerco kaj Industrio kaj de Prezidanto de la Tutruslanda Societo „Ruĝa Kruco“, kun kiuj li multe parolis pri esperantaj aferoj precipe en Ruslando. La Parolado estis interesplena. Ĝi aperos baldaŭ prezita.

— Sekretario de l'Komitato de K. E. S. S-ro M. S. Valentinov donis al la ĉeestantoj novajn sciigojn pri 9-a Universala Kongreso de Esperanto en Berno (Svislando).

— S-ro Prezidanto P. D. Medem rakontis pri sia vizito de Moskva Societo Esperantista kaj faris raporton pri paroladoj de S-ro Abdul Baha en Anglujo kaj Parizo.

Post paroladoj estis demonstritaj gramofonaj diskoj kun esperantaj kantoj kaj deklamadoj.

— Poste sekvis lumbildoj kun vidaĵoj de la urboj: Krakovo, Geneva, Dresdeno, Genève k. t. p.

Klarigis la bildojn S-ro A. M. Neboŝivin—esperante.

— Dum montrado de la nomitaj bildoj estis proponita al ĉeestantoj „Esperanta teo“.

— Detala raporto estas presita la 29-an de Marto en loka gazeto „Nord-Okcidenta Telegrafo“.

— Lastatempe, Krom 59 esper. ĵurnaloj (vidu №№ 4 kaj 5) ni ricevis la sekvantajn:

1. Monda Poŝto.
2. La Kulturo.
3. Esperantista Filatelisto.

— На пятницу 5-го апрѣля, назначено очередное общее собранiе въ залѣ коммерческаго училища въ 8 ч. вечера.

1) Докладъ почетнаго члена А. М. Недошивина „О солидарности среди эсперантистовъ“ на русск. и эспер. языкахъ.

2) „Программа будущей дѣятельности общества“ докладъ предсѣдателя правленія, П. Д. Медема.

3) „Новѣйшiя свѣдѣнiя изъ эспер. жизни“ докладъ секр. правл. М. С. Валентинова.

Перерывъ.

4) Утвержденiе отчета.


5) Текущiя дѣла.

До перерыва *засѣданiе публичное.*

Во время перерыва запись въ члены общества (дѣйствит. чл. 3 р., посѣтители 1 р.

Всѣмъ присутствующимъ будутъ розданы годовые отчеты съ докладомъ поч. чл. А. М. Недошивина на русск. яз.

Въ залѣ будутъ выставлены эсперантскiе журналы, книги, значки, марки и пр.



# Изъ мiра эсперантистовъ.

— *Францiя. Grenoble.* Открыты 18 эспер. курсовъ. Одинъ изъ нихъ спецiально для солдатъ.

— Профессоръ M. Verax, редакторъ журнала „Scienca Gazeto“ получилъ званiе „Officier d'Académie“ за дѣятельную пропаганду яз. Эсперанто.

— *Парижъ.* Открыто бюро Эсперантской Торгово-Промышленной Ассоцiаци.

— *Австро-Венгрія. Вѣна.* Въ „Stiftskasern'ѣ организованы курсы эсперанто яз. для офицеровъ и солдатъ.

— *Голландія.* Въ г. Oeffelt-Эсперант. преподается въ народныхъ школахъ.

— Новыя Общества открыты: въ Бернѣ, Филадельфіи, Стокгольмѣ, Гамбургѣ, Будапештѣ, Бухарештѣ, Благовѣщенскѣ и др.

— *Франція. Парижъ.* Въ журналѣ „Movado“ помѣщенъ списокъ 98 фирмъ, печатающихъ прейсъ-куранты на эспер. языкѣ.

— Г. *Cholet.* Городская дума выдала мѣстному Эспер. О-ву—денежную субсидію.

— г. *Danai.* Судовладѣльцемъ-Эсперантистомъ одинъ изъ новыхъ пароходовъ наименованъ „Эсперанто“.

— *Англія.* Въ Лондонѣ Эсперанто преподается въ вечернихъ школахъ.

Въ Глазговѣ на средства города открыты курсы Эсперанто во всѣхъ вечернихъ школахъ.

— *Германія.* Въ Бреславлѣ открыто 17 курсовъ; изъ нихъ 1 для почтовыхъ чиновниковъ и одинъ для членовъ Краснаго Креста.

Въ Брауншвейгѣ курсъ для шофферовъ при автомольной фабрикѣ Бюссинга; въ Вальденбургѣ-курсы для рабочихъ.

— На конгрессѣ преподавателей чертежнаго искусства были допущены доклады на яз. Эсперанто.

Программа Конгресса редактирована на четырехъ языкахъ, въ томъ числѣ и на Эсперанто.

— *Австрія.* Въ деревушкѣ Энгельбергъ, насчитывающей всего лишь 700 жителей, имѣется уже 42 эсперантиста. (Звѣзда Волги).

— *Голландія.* По сообщенію газеты „Holanda Pioniro“ въ странѣ существуютъ 55 эсперантскихъ обществъ и группъ съ 2031 членомъ. Въ Сентябрѣ 1911 г. было 36 группъ съ 1500 членами.

Въ Гаагѣ готовятся къ національному Конгрессу эсперантистовъ. Распространено болѣе 1000С пропагандныхъ брошюръ.




## Naŭa Universala Kongreso de Esperanto en Berno (Svislando).

— До 15 марта с. г. записалось на конгрессъ 78 человѣкъ, изъ нихъ четверо русскихъ.



## Циркуляръ № 2.

Бюро русской группы на всемірныхъ конгрессахъ („Русское Конгрессъ-Бюро“) принимаетъ на себя пересылку въ комитетъ IX конгресса членскихъ взносовъ (6 р. для главы семьи и по 3 р. для прочихъ членовъ той-же семьи ). Просятъ имена, фамиліи и адреса писать четко и ясно. Членскіе билеты будутъ высланы непосредственно изъ Берна. Адресъ Секретаря и Казначея Русскаго Конгрессъ-Бюро: Ковна, П. Д. Медему.



## БИБЛІОГРАФИЧЕСКІЙ ЛИСТОКЪ. Bibliografio.

La Verkistojn, kiuj deziras, ke „K. E.“ raportu pri iliaj eldonaĵoj, ni petas sendi al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

Novaj libroj ricevitaj de ni por recenzo:

1. Основной курсъ международнаго языка Эсперанто—составилъ А. А. Сахаровъ (цѣна 5 коп).
2. La Premiito, novelo originale verkita en Esperanto de Herschel S. Hall.

3. Tra la loko ensorĉita de J. Ŝirjajev.

4. Biblioteko de Panonio № 1. —La literatura agado de Hungaraj Esperantistoj.


— Ni ricevis donace de D-ro A. Fiŝer lian eldonaĵon „Esperanta legolibro“ (Dua eldono). Al tre estiminda Samideano, kiu ĉiam favore rilatas al nia societo, ni esprimas sinceran dankon.

— О-во получило 1000 экземпляровъ только что изданной книжки: Основной курсъ международнаго языка „Эсперанто“, составленный преподавателемъ и директоромъ Московскаго Института „Эсперанто“ А. А. Сахаровымъ. 32 страницы. Цѣна 5 коп.

Горячо рекомендуемъ книжку всѣмъ для изученія нашего языка.

Несмотря на столь дешевую цѣну 5 к., она вполнѣ достаточна для знакомства съ языкомъ эсперанто, замѣняя болѣе дорогіе учебники.

— Вмѣстѣ съ этой книжкой рекомендуемъ имѣющуюся въ нашемъ книжномъ складѣ—брошюрку: Необходимое объ Эсперанто, составл. П. Стояномъ и В. Нѣжинскимъ. Цѣна 3 коп.



**Al atento de esperantaj eldonontoj.**

*Moskva Librejo „Esperanto“*, 3, Lubjanskij pžojezd, Moskvo, Ruslando (la malnova adreso: 26, Tverskaja) por posedi provizon de ĉiuj esperantaj libroj proponas al esperantaj eldonontoj sendi al ĝi, ne atendante specialan mendon, 10 ekzemplerojn de ĉiu nova libro, akompanante la sendaĵon per fakturo, kie oni devas noti: kvanton, nominalan prezon, rabaton kaj pagotan sumon. La rabaton devas esti tia, ke la librejo mem povu fari rabaton ne malplian, ol 20%-an. Tuj post ricevo de la libroj la librejo pagos la monon per poŝtmandato aŭ per bankĉeko.



## Busto William Stead.

La nederlanda gazeto **Handelsblad** proponas fari monkolekton por skulptigi marmoran buston de nia Samideano, la konata angla ĵurnalisto William Stead kaj ĝin meti en pacpalaco en Hago.

Samideanoj kiuj intencas kunlabori por la efektivigo de tiu plano povas sendi sian adreson al la subskribinto, kiu komunikos la nomojn al la prepara komitato.

*J. F. v. Dam,*
Spaarne 2, Haarlem.



**HUMORAĴOJ.**

*„Arigatoh“*.—Eŭropano, alveturinte en Japanujon, unue eksciis, ke tie ĉi oni diras „arigatoh“ por esprimi sian dankon.—„Bone“, li diris al si.— Mi povas facile memori tiun ĉi vorton, ĉar ĝi tre similas je „aligatoro“. La sekvantan tagon li renkontis konatan al li japanon, kiu salutis lin: „Mi estas, tre ĝoja vidi vin en bona sano“.—„Krokodilo!“ estis fiera respondo de sprita eŭropano.

*El „Orienta Azio“*.

—

Kuracisto—*Viaj lipoj estas dikaj kaj havas strangan formon. Vi estas muzikisto, mi opinias.*

Malsanulo—*Via moŝto divenas!*

Kuracisto—*Kian muzikilon vi ludas?*

Malsanulo—*Tamburegon.*

*El „Portugala Revuo“*.



# II-a Tutrusa Kongreso Esperantista (en Kievo).

Ruslandaj Esperantistoj!

Dum 26 jara ekzistado de esperanto Rusujo havis nur unu konferencon. Tamen por ĉiu estas klara la neceseco de unuiĝo kaj de periodaj kunvenoj. Tial ni estas certaj ke vi aprobos la proponon de KIEVA SOCIETO „VERDA STELO" kaj venos al jam permesita de loka administracio Esperanto Tagaro en Kiev (17-19 aŭg. n. st.) kiu post baldaŭa oficialigo de Ministro de J. A. nomiĝos—**II-a Tutrusa Kongreso Espe-tista**.

Ĉu sub la unua, ĉu sub la dua nomo, ĉu partoprenos aliurbanoj, ĉu nur la Kievanoj, estos plenumita jena programo:

17 de aŭgusto. Matene: Malfermo de la kongreso; ĝenerala kunveno. Posttagmeze: Vizito al tutrusa ekspozicio. Vesp.: Koncerto en Negocia ĝardeno.

18 de aŭgusto. Matene: labora kunsido. Posttagmeze: vizito al antikva ĉefmonaĥejo (лавра) Vesp.: Dua vizito al ekspozicio.

19 de aŭgusto. Matene: ĝenerala kunveno. Fermo de la kongreso. Posttagmeze: Vaporŝippromenado laŭ Dniepr.

Ju pli multaj enskribiĝos, des pli ampleksiĝos la programo kaj des pli riĉiĝos je gravaj rezultatoj tiu kunveno.

La cirkonstancoj favoras nin: malgraŭ la Ekspozicio la guberniestro malpermesis plialtigi la prezojn kaj bona hotelo „Kane" donas al esp-istoj 10% da rabato. Vi vidos antikvan ĉefurbon, nune altkulturan kaj riĉan, la belegan naturon, tutrusan kaj internacian Ekspozicion kun pli da oportunaĵoj kaj pli malk re ol se vi estus neesperantistoj.

Konspektoj de raportoj. łegotaj dum laboraj kunsidoj, estu liveritaj en rusa kaj esp-a lingvoj (aparte) ĝis la 20 de julio maln. st.

La reprezentantoj de UEA., TEKS., TIA. kaj de aliaj asocioj volu senprokraste nin sciigi, ĉu ili kunvenos dum la Tagaro.

La kluboj kaj grupoj sendu delegitojn.

Ĉiaj konsiloj estas danke akceptataj. Oni respondas je informpetoj nur se estos aldonita respondilo.

La kotizaĵo—3 rubloj (kun posta senpaga raporto) estas tuj sendebla per transpagiloj (en konton de „Verda Stelo") kaj poŝtmandatoj al kasisto de O. K. s-ro J. Borodkin, Dumskaja ploŝĉad, mag. Okladĉika.


Se vi ne povas tuj sendi la kotizon, almenaŭ sciigu nin pri alveno.

Sekretarioj-organizantoj:

*G. Jaĵgunoviĉ,*


*M. Kiperman (Kuzneĉnaja, 69).*

*V. Traĉevskij, (B. Podvalnaja, 25.*



## Okaze de la Paskofesto ni sendas al niaj gelegantoj niajn koregajn bondezirojn!

***Red.***



# ОБЪЯВЛЕНІЯ.

Цѣна объявленій: на задней стран. за 1/8 стр.—1 р. за 10 разъ—75 к., на весь годъ по 50 к. за каждый разъ. На первой стр. цѣны двойныя.

La prezo de anoncoj: en lasta paĝo pro 1/8 de paĝo—1 sm. unufoje: pro 10 fojoj—75 sd. por tuta jaro—po 50 sd. p. ĉiu fojo. En la unua paĝo la prezo duobl.




Издатель *Ковенское Общество Эсперантистовъ*.

Редакторъ *М. С. Валентиновъ*.

„Тов. Тип. М. Соколовскаго“ въ Ковнѣ